Raporto de AGEI, landa sekcio de ILEI en Germanio
agado en 2006

Nova estraro estis elektita en junio 2006 dum la Germana E-Kongreso en Braunschweig
sekciestro, prezidanto: Zsofia Korody (krome vicprezidantino de ILEI)
vicprezidanto: Dr. Rudolf Fisher (ekde julio 2007 prezidanto de GEA)
kasisto: Christof Krick (estrarano ankaŭ de GEA)
estrarano: Harald Schmitz

**Membraro:** post kelkaj problemplenaj, malaktivaj jaroj la unuaj taskoj estis reordigi la membraron, zorgi pri la transpago de membrokotizoj al ILEI kaj anonci personajn ŝanĝojn pro la novelektoj al la juĝejo en Hannover.
Membronombro: 88 personoj

**Statuto:** montriĝis bezono refreŝigi, reverki la Statuton, do tio okazis dum 2006 (akceptigo okazas nun, en junio 2007).

**Strukturo:** en la 16 federaciaj landoj de Germanio ni komencis ellabori reton de t.n. regionaj mentoroj, kies tasko estas informi pri kursoj, loka agado, kontakti gekolegojn en la opaj landpartoj, provadi envolvi novajn instruemulojn kaj raporti pri E-instruado (lerneja, eksterlerneja) al la estraro kaj membraro.

**Komitatanoj:** mem la estraranoj, kiuj rajtas reprezenti la asocion ĉe ILEI-konferenco. En 2006 (pro la malalta membronombro en 2005) AGEI rajtis sendi 2 anojn al la komitatkunsido, kiu okazis dum la ILEI-konferenco en Parma (Italio). Partoprenis nur 1 persono: Zsofia Korody, kiel AGEI-reprezentanoto.

**Varbado:** flegado de kontaktoj kun malnovaj membroj, alvoko al remembriĝo, varbado kaj regulaj alvokoj al membriĝo (ekz.en la Cirkulero sendata nenur al membroj, sed al centoj da homoj iel envolvataj en kaj interesataj pri E-instruado, dum E-renkontiĝoj, ktp.)

**Informado:** AGEI ne plu eldonas propran gazeton. Kiel informkanalo servas IPR, Esperanto aktuell (2-monata gazeto al ĉiuj membroj de GEA) kaj porokaza (preskaŭ ĉiumonata) Cirkulero rete sendata al AGEI-membroj kaj poŝte al neretumantoj.

**Kunsidoj:** ĝenerale 2-foje jare; la jarĉefkunveno laŭ la tradicio ankaŭ en 2006 okazis dum la Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig, alia multnombra kunveno estis en oktobro dum la Tutlandaj Oktobraj Pedagogiaj Tagoj (Torpedo 2).

**Programoj:**
Trejnado: AGEI pere de la Klerigcentro de GEA en Herzberg am Harz, la Espranto-urbo prizorgas trejnadon de E-kursestroj, instruantoj. La studsesioj ofertas esperantologiajn, metodikajn studojn, kun altnivelaj prelegoj, trejnsesioj. Aliaj faktemoj: literaturo, gramatiko, historio, tradukarto, varbado, interlingvistiko. En 2006 okazis 4 studsemajnfinoj kaj krome Torpedo 2, kun du ĉeftemoj: 1. instrumaterialoj, instruhelpiloj kaj metodiko de E-instruado, 2. pluklerigado de ekzamenantoj. Unu el lal ĉefceloj estas ankaŭ ebligi dum tiuj tagoj rektan spertinterŝanĝon de gekolegoj, E-instruantoj en formo de t.n. isntruista bazaro, kie ĉiuj povas

prezenti unu al la aliaj proprajn metodojn, uzatajn, ŝatatajn materialojn ktp. Pro la sukceso de la unuaj pedagogiaj tagoj ni planas regule oferti tion ne nur al la enlandaj gekolegoj sed ankaŭ al eksterlandaj vizitontoj. Laŭ la decido de ILEI-estraro en novembro 2006 la E-centro en Herzberg estas konsiderata ankaŭ kiel klerigcentro por ILEI.

Trejnprogramoj dum aliaj E-renkontiĝoj: La unuan fojon en 2006 okazis ankaŭ prezentado de la klerig-sistemo dum la tradicia Printempa Semajno Internacia (PSI) organizita de GEA, ofertante al la partoprenantoj enkondukan partopreneblon en la fakstudado.
AGEI/ILEI membroj ricevas rabaton se ili partoprenas studprogramojn. Membroj de GEJ ricevas vojaĝ- kaj partopren-subvencion de GEA.
Same gravas zorgi pri la estonto per studprogramo al la junularo: en decembro 2006 dum Internacia Semajno (IS) (tradicia junulara renkontiĝo de GEJ je jarŝanĝo) ni ofertis ILEI-seminarion al junaj studemuloj: Flugiloj de malfacila vento. Temis pri speciala gramatika kaj instru-metodika trejnado por instruemuloj.

**Ekzamenoj.** AGEI ankaŭ organizas la naciajn trinivelajn lingvo-ekzamenojn de Germana Esperanto-Instituto (GEI) kaj ankaŭ la dunivelajn internaciajn UEA/ILEI-ekzamenojn. Jen statistiko por 2006: GEI ekzamenoj: 3 sesioj, 40 sukcesintoj (25 A, 11 B, 4 C nivelaj ekzamenitoj)
ILEI-ekzamenoj: 2 sesioj, 21 sukcesintoj (10 elementnivelaj, 11 meznivelaj ekzamenitoj)

**Servoj** al la membraro: faka helpo, konsiloj pri organizado de kursoj, lerneja instruado, instigo al partopreno en internaciaj projektoj, ktp., dispono de faklibroj, gazetoj en la biblioteko kaj arkivo de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg. Eblas tie preskaŭ dum la tuta jaro studi, legi, prunti librojn, aŭd- kaj vidmaterialojn, uzi la seminarĉambrojn, teknikaĵojn.

**Celoj:**
plifortigo de loka kaj regiona agadoj, metodika helpo al instruantoj en diversaj niveloj kaj al diversaj ĝgrupoj, ellaboro de helpmaterialoj, informado pri rekomendoj, dokumentoj pri jura stato por E-instruado, ktp.